Eŭropa Bulteno

Februaro 2020, Numero 200

# LA JUBILEO




Kiel vi povas vidi, ĉi tiu estas 200-a numero de Eŭropa Bulteno. Mi redaktas ĝin ekde 100a numero jam pli ol 10 jarojn. Kaj ĝi iĝis spegulo de esperantistoj el EU ĉefe turnita al lingvaj demandoj kaj politikoj en EU. Nun ŝajnas al mi ke jam multaj alkutimiĝis al ĝia ekzisto kaj konsultas ĝin regule. La historio de EB estas ne komplete lineara. Unuaj Bultenoj estis kreitaj de la unua prezidanto de EEU: Umberto Brocatelli. Poste estis ioma paŭzo ĝis en 2002 Daffid Ap Fago kreis Dokumentan Centron en Bruselo kaj daŭrigis redakti ankaŭ la Eŭropan Bultenon. Post li en 2005 transprenis la laboron Marko Naoki Lins dum du jaroj. Nova redaktoro iĝis en 2007 Vesna Obradović ĝis 2010 kiam akurate la numeron 100 en 2010 ekredaktis mi kaj faras tion ankoraŭ nun.

Mi ŝatus aŭdi opiniojn de legantoj pri ĝi, kiujn mi aperigos en la sekva numero. Mi atendas viajn leterojn kun viaj rimarkoj kaj proponoj.
La redaktoro

Pajo

# MULTLINGVA AKCELILO FINITA – LA PAĜARO PUBLIKIGITA




Akcelilo por multlingveco estas instruplano, kiu ebligas al infanoj pli rapide lerni fremdajn lingvojn kaj memfidiĝi pri sia kapablo de lingvolernado. Ĝi baziĝas je la propedeutika ideo, ke lerni modellingvon, en nia kazo bazan Esperanton reduktitan al la plej ofte uzataj 300 morfemoj, povas plibonigi lingvolernajn kapablojn de infanoj. Pluraj studoj montris, ke unujara lernado de la modellingvo Esperanto ĝis 30% plirapidigas postan lernadon de aliaj lingvoj. La kialo estas, ke la modellingvo estas tre facila, ne havas esceptojn kaj funkcias kiel logika konstrumodelo. Ĝi ebligas al infanoj kompreni fundamentajn lingvajn principojn pere de malkonstruado kaj rekonstruado de vortoj kaj frazoj. Ĝi estas multe pli efika ol aliaj lingvoj por instigi lernantojn lerni pro la eblo de la komenco mem konstrui proprajn frazojn.

Per tiu ĉi kurso infanoj lude lernas minimumon de analiza lingvo, kiu donas al ili klaran ideon pri tio kiel lingvoj funkcias. Infanoj komprenas tipojn de vortoj, terminojn kiel pluralon, la bazajn du kazojn (nominativon kaj akuzativon), la manieron krei frazojn kaj ili akiras la kapablon krei multajn novajn vortojn el bazaj radikoj kaj afiksoj kiujn ĉiu lingvo ofertas. Tio komprenigas al infanoj la strukturon de lingvoj ĝenerale kaj donas al ili la tiel nomatajn meta-lingvajn sciojn.

Fine post 26 monatoj da laboro en kiu partoprenis vere la plej gravaj fakuloj de la Esperanto-Movado necesaj en tia projekto, kune kun neesperantistaj fakuloj kaj lernejoj, la projekto estas finfarita kaj sendita raporto al la financanto. Tio kio gravas por la ĝenerala publiko estas ke aperis publike en la reto paĝaro de MLA, kiu ebligas aplikon de la projekto en lernejoj kaj ĉiuj aliaj konvenaj lokoj.

Mallonge por tiuj kiuj ne komprenas ankoraŭ pri kio temas, mi diras ke Multlingva Akcelilo estas kompleta instrumaterialo por enkonduka lernobjekto kiu celas esence plirapidigi lernadon de fremdlingvoj en lernejoj. MLA kiel enkonduko por fremdlingvoj estas aplikita Esperanto por infanoj 8-jaraj kiu servas al infanoj kompreni esencajn elementojn de strukturo de lingvoj ĝenerale. Kaj ne malpli grave, la projekto ebligas ke ĝin povas apliki (instrui) kiu ajn instruisto de fremdlingvoj en lernejoj, ne scianta Esperanton. Sufiĉas instrukcioj, kiujn li trovas en la paĝaro en sia lingvo. La projekton oni nun povas apliki en jenaj lingvoj: la angla, la germana, la kroata, slovena, slovaka, bulgara kaj rusa. Ĝi ekzistas ankaŭ en Esperanto. Preskaŭ pretaj (praktike uzeblaj) estas jam ankaŭ la versioj de la franca, hispana kaj portugala. Por ĉiuj aliaj lingvoj, interesitoj, kiuj pretas la instrukciojn kaj gramatikaĵojn traduki al siaj lingvoj, sufiĉas skribi al ni, kiuj okupiĝis kaj ankoraŭ plu okupiĝos pri ĝi. Vi ricevos aliron al projekta tradukilo kaj povos adapti ĝin al nova lingvo.


Kvankam ĝi estis farita por Eŭropa Unio, kiu pagis ĝin pere de programo Erasmus+, ĝi ja nun estas libere disponebla por ĉiuj en la mondo.

La plej grava valoro de tiu ĉi projekto estas ke ĝi povas sen apartaj preparoj atingi lernadon de Esperanto (nome tiu parto kiu troviĝas en ĝi) en elementaj lernejoj, por infanoj de tre juna aĝo. Por ili aparte ĝis nun ne ekzistis tiaspeca instruilo. Ĝi baziĝas je atingoj de la Zagreba

Metodo kiu havas sian bazon en scienca esploro de la plej oftaj morfemoj en Esperanto. Tio ebligas praktike kaj per ludo konsciigi al infanoj ĉiujn esencajn elementojn de lingva strukturo.



Kiel ni jam raportis, dum la projekto estis faritaj pluraj statistikoj kaj testoj kiuj montris ke kaj la gepatroj, kaj la geinstruistoj kaj la infanoj estas tre kontentaj pro lernado de MLA kaj ŝatus plulerni ĝin almenaŭ en lernejoj kie la eksperimento okazis (Vraca –Bulgario, Šentilj – Slovenio kaj Zagreb – Kroatio). Ankaŭ el la enketoj vidiĝis kia nun estis kompreno de la infanoj pri metalingvaj strukturoj de lingvoj ĝenerale kaj kiuj pedagogiaj metodoj estis tre ŝatataj kaj kiuj malpli.



La plej grava estis kunlaboro en la projekto de vere grandiozaj fakuloj – esperantistoj - kio montris ke ni disponas pri grandiozaj homaj kapacitoj, ĉar la plej grava kunlaborlingvo – krom la angla – estis Esperanto. Nia granda fakulo pri komputila lingvistiko d-ro Eckhard Bick el Danlando kreis kurseron tute novan por E-instruado: uzon de komputilo por krei frazojn uzatajn en ekzercoj. Nia vere tre kompetenta E-teamo en kreado de la retpaĝaro Studio Gaus, bonege kunlaboris kun ĉiuj kaj finrealigis la paĝaron, kio estas esenca por la projekto. Niaj fakuloj pri projekt-kreado en Inter-kulturo en Maribor kapablis bonege verki la projekton por ke ĝi estu akceptita kaj la tuton kunordigis Maja Tišljar kaj mi. Siajn kontribuojn profesie faris ankaŭ E@I fakuloj kaj instruistoj de la tri menciitaj lernejoj. Gre grava estis kontribuo de profesorino Alja Lipavic Oštir el Maribora Universitato, kiu kreis testojn kaj statistikaĵojn por kontroli la rezultojn de

ekspermenta instruado laŭ MLA en tri elemnatja lernejoj. Necesas mencii gravan kunlaboron ankaŭ de aliaj esperantistoj kiuj siamaniere multe helpis kiel EEU-prezidanto – d-ro Seán Ó Riain per provlegado de la anglaj tekstoj, poeto Miguel Fernamdez Aduriz kiu verkis kantojn por la lecionoj kaj pluraj aliaj.

Tio montras ke vere tre profesiaj rezultoj povas esti atendataj de profesia kunlaboro de diversaj fakuloj kaj ke tio ne eblas sen mono. Multon faras kaj povas fari amatoroj, sed tian projekton eblas realigi nur per multnombra skiparo de gravaj, kompetentaj fakuloj.
Fine mi diru, ke nun la pilkon devas transpreni organizita Esperanto-movado. Povas esti ke neniu plu zorgos pri la rezultoj kaj tiam ĝi restos unu el multaj intersaj sed ne speciale grava provo ŝanĝi ion en lernejoj. Aŭ ni – la Movado - serioze komprenos tiun ilon por nerekte enkonduki E-on en lernejojn. Ĝi per si mem ne estas instruado de Esperanto por fortigi la Movadon, sed helpilo por rapidigi lernadon de fremdlingvoj. Tial ĝi povas relative facile eniri la lernejojn, ĉar ni ne devas konvinki lernejajan gvidantojn ke ili aprobu tian lernobjekton – la plej multaj tuj komprenas ke tio estas utila por la lernejoj. Aliflanke dum realigo de la projekto oni organizas lingvan internacian kunlaboron de la infanoj kiuj per interŝanĝoj kaj renkontoj praktikas la lernitan materialon, sed per ili ankaŭ enproprigas, esperantistajn celojn – ekkunlabori kun aliaj kaj postulas de la lernejoj daŭrigi la lernadon – ne plu Lingvan Akcelilon sed lingvon por kontakti la mondon.




Jen la kontaktlinio al MLA: www.lernu.net/eo/instruado

La instrumaterialoj nun estas plene tradukitaj al 8 lingvoj kaj pliaj 2 grandparte. Krom tradukantoj ene de la partneraj organizoj de la projekto, ni kore dankas al esperantistoj volontuloj kiuj jam helpis traduki la materialojn al 4 lingvoj pli ol ni devis fari laŭ la projektkontrakto. Specialan dankon ni ŝuldas al Mariana Evlogieva, kiu helpis al la oficiala Bulgara projektpartnero, la lernejo el Vraca, kiu ne povis mem traduki grandan parton de materialoj por kies kvalita traduko nepre necesis traduko rekte de Esperanto. La kvalito de materialoj en la Bulgara ne estus bona se tadukata de neesperantistoj pere la anlga tekstversio. Se vi deziras traduki la materialojn en la retejo al via lingvo, vi povas fari tion registriĝante kiel tradukanto de la tradukejo de lernu! - https://lernu.traduko.net. En la dosierujo mla de la tradukejo troviĝas cxiuj tradukendaj materialoj. Kiam vi tradukos 70% de la tekstoj bezonatajn por instrumaterialoj, en la paĝaro aperos pdf-dosieroj kun la materialoj en via lingvo.

Zlatko Tišljar

# RAPORTO PRI LA AGADO DE EEU EN 2019

## Ekstera Agado

La Platformo por multlingveco plu ekzistis en 2019 kaj en ĝi plu estas EEU, sed ĝi ne aktivis krom ke ĝi okazigis nur sian jarkonferencon en kiu partoprenis neniu el EEU. Tio bedaŭrinde montras ke EU ne efektive opinias la multlingvecon grava celo – ŝajne ke la gvidantaro opinias ke la unulingveco jam superregis.

En 2019 EEU ne ricevis financojn por iu ajn projekto financata de EU kaj tial ni ne havis aliajn kromfinancojn, krom la kotizoj. Tamen aliaj E-organizoj ricevis gravan projekton kiu estas realigata en 2018 kaj 2019 Multlingva Akcelilo kaj kie EEU estis asociita partnero. Tiun projekton EEU plene subtenas kaj en ĝi aktivas la sekretario kaj la prezidanto de EEU. La aktivado ene de tiu projekto en 2019 estis tre sukcesa kaj tial nia plano por 2019 grandparte ligiĝas al la projekto Multlingva Akcelilo, kiu promesas gravajn ŝancojn por E en lernejoj. Fine de 2019 tiu projekto finiĝis kaj estis sendita raporto. Seán, Zlatko kaj Maja ege multe laboris por sukcesigi la 26-monatan projekton. Ĝi troviĝas en la kontaktlinio www.lernu.net/eo/instruado. La tuta kurso de MLA nun estas uzebla en deko da lingvoj inter kiuj Esperanto.

La portalo de la projekto lingvo.info kiun ni finis en 2015 daŭre funkcias kaj multaj homoj informiĝas pri lingvoj en ĝi. Ĝi estas atingebla ĉe http://lingvo.info/eo/ Ni esperas kadre de novaj financprogramoj de EU, en la financkadro 2021-2027 de EU, reekhavi la eblon provi financi novan projekton por plulabori pri ĝi. Bedaŭrinde la ideoj pri ĝia plilarĝigo por infanoj, kaj la baza ideo de de lingvo.info pri edukado pri lingvoj enrete ne taŭgis por financado kadre de Erasmus+. Ni atendas la jaron 2021 por vidi kiajn eblojn donos al ni pri tio la novaj generacio de la programo.



Okaze de la Eŭropa Tago de la Lingvoj EEU dissendis inviton al la landaj asocioj prifesti ĝin kaj publikigi la aktivecojn. Ne multaj vere faris ion, tamen, ni ricevis dekon da informoj pri diversaj manifestaĵoj al tiu Tago dediĉitaĵ.

Maja kaj Zlatko Tišljar kun helpo de Maja Cimerman ellaboris dum la jaro 4 projektojn por financadofar EU ĉe Eŭropo por Civitanoj kaj Erasmus+. El ili bedaŭrinde neniu ghis nun sukcesis. Sed ankoraŭ du estas ankoraŭ atendantaj ĉu ili estos akceptitaj. En unu el ili EEU estus gvida partnero.

La membroj de la estraro, sed ankaŭ aliaj aktivuloj kaj asembleaj membroj partoprenis en kelkaj neesperantistaj politikaj, sciencaj kaj interesorganizaj konferencoj kaj kunsidoj diverstipaj.

Aparte elstaris la laboro de Seán Ó Riain, kiu partoprenis en deko da konferencoj kaj prelegis reprezentante tiel EEU. Jozef Reinvart aktive laboris en sia lando por prezenti propopon pri tio ke ankaŭ Slovakio akceptu Esperanton kiel kulturan heredaĵon.



Grandan aktivadon faris la prezidanto Seán Ó Riain havante la taskon daŭre teni kontaktojn kun la Komisionano de EU-Komisiono Vytenis Andriukaitis. Seán sukcesis konvinki la komisionanon akcepti esti ĉefparolanto en la konferencoo de EEU En Triesto. Bedaŭrinde Andriukaitis fine ne povis veni al Triesto, sed surbendigis videe sian paroladon, kiun ni montris dum la malfermo de la Triesta konferenco. Ĝi ankaŭ aperis en Oficiala paĝaro de Eŭropa Komisiono en Esperanto dum Vytenis Andriukaitis ankoraŭ havis sian paĝon kadre de la paĝaro de la Eŭropa Komisiono.

Gravaj atingoj por Esperanto en Eŭropo en kiuj EEU ne rekte partoprenis:
Reta kurso learn.esperanto.com stimulata de EEU plu estas uzata en la mondo kaj estis ankaŭ uzata kadre de la Multlingva Akcelilo. Unu el atingoj estis produkto de Svedaj Esperantistoj kiuj sukcesis ricevi videan parolon en Esperanto far sveda ministrino por UK en Finnlando.

# Enmovada Agado

En 2019 la ĉefaj administraj devoj estis orgnizitaj kadre de la Itala Esperanto-kongreso en Triesto, kie EEU havis kunsidojn de la asembleo kaj la estraro.



Okazis ĉefa asemblea kunsido kun la oficiala raporta tagordo. Ĉeestis 11 asembleanoj el 11 landaj asocioj el 16 kiuj pagis kotizojn, kio sufiĉis ke la asembleo plenrajte decidadis. Post la raporto pri la agado en 2018, pri la financoj en 2018 kaj revizoro kaj ioma diskuto ĉiuj raportoj estis akceptitaj unuvoĉe. Ankaŭ laborplano por 2019 estis akceptita.

Okazis ankaŭ malferma asemblea kaj publika kunveno kun interesitaj kongresanoj de la Itala E-kongreso. La kunsido prezentis du gravajn atingojn en Eŭropo, la agnoskon de Esperanto kiel kultura heredaĵo de Kroatio kaj la finrezultojn de la Multlingva Akcelilo. Okazis vigla debato pri tio.

Ulrich Brandenburg partoprenis en Germana Esperanto-Kongreso. La tuta estraro estis aktiva en kontaktoj kun landaj Asocioj. Seán ĉeestis en kongresoj kaj festoj en Ĉeĥio, Slovakio, Germanio, Aŭstrio, Hispanio, Zlatko Tišljar daŭre aktivis kaj kunlaboris kun Kroatia kaj Slovena Esperanto-ligoj kaj aranĝis konferencon en Italio kunlabore kun Itala Esperanto-Asocio kaj skribante pri EEU en itala Esperanto-revuo, Ulrich Brandenburg kunorganizis kaj prelegis en Germana Esperanto-Kongreso. Flory Witdoeckt havis konstantan kunlaboron kun la Belgaj Esperanto-Asocioj.

Okaze de Zamenhoftago en solenaj prifestoj partoprenis Seán Ó Riain en Vieno: prifesto de 70 jaroj de la Viena Muzeo kaj Zamnehoftago de Aŭstio, en kiu kunfestis ankaŭ Kroatoj kaj Slovakoj.

La Eŭropa Bulteno regule aperis 11-foje (ĉiumonate krom en julio kaj aŭgusto kiam ĝi aperis kiel duobla numero). Ĉiu numero aperis je 10-18 paĝoj. Ĝin ni publikigis en la paĝaro de EEU www.europo.eu. Kopie ĝi aperas ankaŭ en la retejo de Remuŝ. Eŭropan Bultenon redaktis Zlatko Tišljar. Teknike aranĝis ĝin Maja Tišljar. Ĝi estas la plej grava spegulo de ĉio en Eŭropo kio rilatas al Eŭropa politiko pri lingvoj.

La kunlaboro kun UEA estis bona: Niaj delegitoj en UEA-komitato aktive partoprenis en ties kunsidoj en Lahtio.

**La landa agado** estis kontentiga. Ni informis la membraron pri la raporto de eŭropa Ombudsmano pri la enketo en kiu partoprenis multaj esperantistoj. Tiusence la rezultoj de la enketo montris senteblan nombron da tiuj kiuj proponis Esperanton kiel eŭropan lingvon.
Ni ankaŭ invitis landajn asociojn soleni la Eŭropan Lingvan tagon la 26-an de septembro, kion kelkdeko da asocioj kaj urbaj socitoj faris.
Bona kunlaboro pludaŭris kun Germana Esperanto-Asocio, kiu plu administras salajron de nia direktorino Maja Tišljar.
Krome ni realigis preskaŭ ĉiujn punktojn de nia laborplano por 2018.
Prizorgadon de la retpaĝaro plenumis Maja Tišljar, ĉefe prizorgante publikigon de la Eŭropa Bulteno.
Ankaŭ la tuta administrado (prizorgo de dokumentaro, ellaboro de novaj projektoj kaj raportoj, prizorgo de financoj, estis plene plenumita, kion prizorgis Maja Tišljar, Flory Witdoeckt kaj Zlatko Tišljar. La estraro ankaŭ preparis ampleksan laborplanon por 2020-a jaro kiu aperis en la novembra numero de EB.

## Financoj

La kotizpagado en 2019 estis preskaŭ la sama kiel en antaŭa jaro: Pagis 16 asocioj.
La jaro finance estis nebona, ĉar ni ricevis neniun novan projekton kaj kelkaj landaj asocioj plu evitas pagi.
Flory Witdoeckt ellaboris la financan raporton por la financaj instancoj de Belgio por 2018 kaj por la asembleo en Triesto. Ŝi daŭre librotenas la tutan financan laboron.

Zlatko Tišljar, sekretario de EEU
Februaro 2020

# KONSULTIĜO EN MINISTERIO DE KULTURO DE SLOVAKIO

Vicprezidanto de Slovakia Esperanto Federacio (SKEF) kaj eksestrarano de Eŭropa Esperanto Unio (EEU) Peter Balaž kaj Jozef Reinvart havis la 25-a de februaro 2020 konsultiĝon kun Barbora Morongová, direktorino de departemento pri nemateria kultura heredaĵo (NKH) de Ministerio de Kulturo (Ministerio) de Slovakio, prezidanto de komisiono por NKH, pri decido de la Ministerio ne listigi en la nacian reprezentan liston de NKH de Slovakio en la jaro 2019 proponitan elementon de SKEF kaj Slovakia Esperanto Junularo (SKEJ) "Lingvo Esperanto - portilo de slovaka kaj Esperanta kulturoj".

La administra organizo por NKH Centro de Tradicia Popola Kulturo (CTPK) en sia letero de la 5-a de februaro 2020 informis Peter Baláž, prezidanton de SKEF, pri decido de la Ministerio ne listigi la proponitan elementon de SKEF kaj SKEJ en la nacian reprezentan liston de NKH en la jaro 2019.

La CTPK en sia letero informis, ke la proponita elemento plenumis ĉiujn postulatajn formalaĵojn, kiun taksis du sendependaj spertaj fakuloj kaj membroj de faka komisiono por taksado de proponitaj elementoj por listigo en la reprezentan liston de NKH de Slovakio dum du sesioj en 2019. La komisiono rekomendis al Ľubica Laššaková, ministrino de kulturo de Slovakio, ne listigi la elementon de SKEF kaj SKEJ en la reprezentan liston de NKH de Slovakio en la jaro 2019.

Argumentoj de la negativa decido en la letero estis jenaj:

*"En la kazo de Esperanto, kiel kandidato por enskribiĝo en la reprezentan liston de NKH de Slovakio, temas pri artefarita lingvo, kiu ne estas NKH de Slovakio laŭ ĝia Statuto. Ĝi estas internacia lingvo, kiu ne havas naciajn specifaĵojn kaj ne plenumas kriteriojn de kontinueco en natura medio".*

Celo de la konsultiĝo estis ekscii pri veraj kialoj de la negativa decido de la Ministerio. Ĉu ĝi estis politika aŭ „faka“ decido kun antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto kaj ĝia nacia kaj internacia movado.

Komence de la konsultiĝo mi esprimis seniluziiĝon de la proponantoj kaj petis direktorinon pri klarigo de veraj kialoj de la negativa decido. Mi informis la direktorinon, ke „fakaj“ kialoj prezentitaj en la letero pri Esperanto „artefarita lingvo“ estis argumentoj de la 19-a jarcento, kiam Esperanto estis en 1887 prezentita kiel projekto de la internacia lingvo. La kialoj absolute neglektis pli ol 130-jaran evoluon de Esperanto, ĝia kulturo, komunumo kaj movado.

Mi aldonis, ke la planlingvo Esperanto, dum pli ol 5 generacioj trairis 28 evoluojn (laŭ studo de D-ro Detlev Blanke, mondkonata linterlingvisto de Universitato de Humbolt en Berlino en 2016). Ĝi fariĝis la sola el ĉirkaŭ 1000 projektoj de internacia lingvo, tute funkcianta, moderna kaj viva lingvo aplikebla en ĉiuj kampoj de socia vivo, je nacia kaj ankaŭ internacia niveloj, kun ĉiuj atributoj kiel naciaj lingvoj.

Mi informis ŝin, ke same ni povus nomi "artefaritaj lingvoj" ĉiujn naciajn lingvojn, ĉe ilia komenco, kiujn iniciatis komence unu persono aŭ kolektivo, ekzemple la slovaka estis kodifikita en la jaro 1843 de Ľudovít Štúr, la plej grava reprezentanto de la slovaka nacia vivo kaj kodiganto de la slovaka norma lingvo bazita je centra slovaka dialekto. Plia aktuala ekzemplo estas la luksemburga, kiu estis normigita pere de kolektivo da lingvistoj en 1984 (de komenco ĝi povis esti nomita „artefarita lingvo“) kaj post 25 jaroj da lingva evoluo kaj kreado de terminologio, ĝi fariĝis la unua nacia, oficiala kaj identeca lingvo de la lando en 2009 kiam la nacia parlamento ŝanĝis Konstitucion de Luksemburgio. Simile „artefarita lingvo“ povis esti nomita ĉe la slovaka signolingvo en ĝia komenco, kiu estis enskribita en la reprezentan liston de NKH de Slovakio en la jaro 2018.

La direktorino informis min, ke la proponitan elementon de SKEF kaj SKEJ taksis du sendependaj fakaj taksantoj, kiuj estis selektitaj de la listo de 5 fakuloj (interlingvistoj kaj lingvistoj), kiun rekomendis al ŝi estrino de la unuo por klerigado de Slovakia Komisiono por UNESKO (kiun ŝi ricevis de ni, dank´ al nia lobiado por sendepende proponi al ili kompetentajn fakulojn, kiuj konas interlingvistikon, Esperanton kaj nian movadon). La direktorino dankis pro tia propono, kiu multe faciligis al la CTPK fari taksadon de nia proponita elemento.

La direktorino same informis min, ke ambaŭ taksadoj de seleklektitaj sendependaj fakuloj estis pozitivaj pri nia proponita elemento. Tiuj dokumentoj estis prezentitaj al membroj de la faka komisiono por taksado de proponitaj elementoj de NKH. La komisiono post trastudo kaj konsidero de la formularo de SKEF kaj SKEJ kaj ĉiuj aldonitaj dokumentoj kaj materialoj dum du kunsidoj intense diskutis pri nia elemento.

La faka komisiono kiel ankaŭ du sendependaj taksantoj pozitive taksis la aktivecojn de SKEF kaj SKEJ, Esperanto-movadon en Slovakio kaj kontribuon de Esperanto enlande kaj eksterlande por helpi solvi aktualajn lingvajn kaj kulturajn problemojn kaj negativajn evoluojn (naciismo, ekstremismo, interetna maltoleremo, ktp) en nia lando, en EU/Eŭropo kaj la mondo.

Kiam voĉdonis la faka komitato, ĉiuj 13 membroj malkonsentis pri enskribo de proponita elemento de SKEF kaj SKEJ en la reprezentan liston de NKH de Slovakio. Ilia ĉefa argumento estis, ke Esperanto kaj nia movado ne enhavas nacian unikecon kaj specifecojn kaj ne plenumas la kriterion de la Statuto de reprezenta listo de NKH de Slovakio. La direktorino diris, ke laŭ opinio de membroj de la faka komisiono ke nia propono pli taŭgus al listo de plej bonaj manieroj por protekto de NKH de Slovakio.

En sekva diskuto mi kontraŭargumentis al la direktorino per pluraj specifaj aktivecoj kaj projektoj menciitaj en nia propono, ke nia elemento havas slovakajn naciajn specifojn, la unikecon kreitan de 5 generacioj de Esperanto en Slovakio kaj disvastigitaj en la mondo, riĉigante Esperanto-movadon en EU/Eŭropo kaj la mondo, tiel kontribuante al la kreado de transnacia kulturo de Esperanto-movado. Mi ankaŭ memorigis ŝin, ke en la jaroj 1976 - 1993 Ministerio de Kulturo de Slovakio rekte administris kaj finance subtenadis Slovakian Esperanto Asocion.

Mi aldone informis ŝin, ke la sama elemento Esperanto kaj ĝia kulturo estis jam enskribita en naciaj listoj de NKH en Pollando en 2014 kaj Kroatio en 2018, kaj en siaj naciaj listoj, konsciante ke ili havas nacian unikecon kaj specifecojn. Ŝi argumentis, ke ĉiu lando enskribas en sian nacian liston, siajn naciajn originalecojn unikecojn kaj membroj de la faka komisiono ne ŝatas kiam proponantoj mencias ekzemplojn, proponojn de aliaj landoj aŭ de internacia nivelo de UNESKO por enskribi ilin en la mondan liston de KNH de UNESKO.

Mi petis la direktorinon pri neformala prezento de nia proponita elemento al membroj de la faka komisiono por havi eblecon prezenti al ili nacian unikecon kaj specifecojn de la proponita elemento kaj por diskuti ilin kun la komisiono. Ŝi diris, ke laŭ aktuala Statuto ne eblas fari la konsultiĝojn kaj disktutojn kun membroj de la faka komisiono. Sed la Ministerio planas ĉijare ŝanĝi la Statuton kaj ebligi konsultiĝojn por pli bone prezenti kaj konsciigi membrojn de la komisiono pri proponitaj elementoj.

Mi informis la direktorinon, ke SKEF kaj SKEJ volas proponi aktualigitan elementon ankaŭ en la jaro 2020 ĝis la limdato la 31-a de marto 2020.

La direktorino estis malfermita al diskuto kaj proponis al mi, ke ni interkonsentu (Peter Baláž kaj Jozef Reinvart) pri konsultiĝo kun Ľubica Volanská, vicprezitantino de la faka komisiono de NKH, kiu estas ankaŭ membro de eksperta konsilia teamo por takso de proponoj de NKH de UNESKO. Mi bonvenigis ĉi tiun proponon por la renkontiĝo komence de marto, kiun volus partopreni ankaŭ la direktorino.

Mi esperas, ke la proponita konsultiĝo helpos al ni bone prepari aktualigitan proponon de la elemento por la jaro 2020 kaj dum la jaro havi konsultiĝon kun membroj de la faka komisiono, por eviti kialojn pro kiuj ne eblis lastjare enskribi nian elementon en la reprezentan liston de NKH de Slovakio.

Mi opinias, ke niaj spertoj helpos al aliaj landaj asocioj de EEU prepari iliajn proponojn por listigo de Esperanto kaj ĝia kulturo en naciajn listojn de NKH. En kazo de intereso pri pli detalaj informoj eblas kontakti min je retadreso jozef.reinvart@gmail.com.

Jozef Reinvart

# PROTESTO

La krizo rilate kun la disvastiĝo de la viruso COVID-19 kondukas al tuja aktivado de eksterordinaraj mezuroj por eviti la disvastigon de la epidemio en pluraj landoj. Temas pri evento, kiu manifestiĝas en internacia kadro nun karakterizita de la realo de Eŭropa Unio, kiu devus garantii al eŭropaj gecivitanoj komunan perspektivon de referenco kaj kunordigon inter naciaj sistemoj. Kaj ĝuste el la EU, oni atendus bonan administradon de la krizo, kiu montrus konkretan atenton al la lingvaj diferencoj. Tio postulas antaŭ ĉio la eblecon atingi ĉiujn eŭropajn gecivitanojn, tiel garantiante al ili ĉiuj la eblecon kompreni (kaj sekve respekti) la esceptajn mezurojn ellasitajn.

Kun profunda bedaŭro, tamen, oni trovis, ke gazetara komuniko de nur kvar paĝoj eldonita la 24an de februaro enhavis informojn pri la agado de Eŭropa Unio pri la epidemio nur en la angla. La unuaj tradukoj al aliaj oficialaj lingvoj aperis nur post tri aŭ kvar tagoj. Nitobe, la asocio por protekto de lingva justeco kaj demokratio, petas, ke oni ne respektu rajton de ĉiuj eŭropanoj rapide kaj klare ricevi la informojn necesajn por la protekto de sia sano. Post la eliro de Britio el Eŭropa Unio, la angla estas la gepatra lingvo de eĉ ne 2% de la eŭropa loĝantaro, kaj la elekto eldoni nur en la angla urĝajn dokumentojn adresitajn al la tuta loĝantaro ne havas sencon laŭ ia valida kriterio de komunikada efikeco.

Ni petas, ke estu rekonebla la efika rajto de aliro de ĉiuj eŭropaj gecivitanoj al fundamentaj informoj, pli malpli en la kunteksto de krizo kiel la nuna. Ĉi tiu rajto laŭ nia vidpunkto baziĝas ankaŭ sur justa aliro al informoj, kiu devas esti senprokraste esprimita en la plej granda ebla nombro da lingvoj oficiale agnoskitaj de Eŭropa Unio kaj ideale en ĉiuj.

Michele Gazolla

# VYTENIS ANDRIUKAITIS – NOVA AMBASADORO DE MONDA ORGANIZAĴO PRI SANO POR EŬROPA REGIONO

Eksa Membro de eŭropa Komisiono esperantisto Vytenis ANDRIUKAITIS ekde la 1-a de marto 2020 eklaboras kiel speciala ambasadoro de la Monda Organizajho pri Sano por Eŭropa regiono. Li okupiĝos pri ĉiuj sanrilataj aferoj. Lia oficejo estos en Kopenhago. Sub lia labortereno estos 53 Europaj ŝtatoj. Antaŭvideblas, ke li tre multe oficvojaĝos - pli-malpli ĉiusemajne li estos en alia lando.

Samtempe Vytenis ANDRIUKAITIS laboros kiel eksperto-konsilisto pri sano ĉe UNO. Krome. li prelegos en universitato de Ghenevo.

Hodiaŭ (27.02.2020) pri tio informas multaj Litoviaj amaskomunikiloj. Novaĵretejo de Litovia nacia radio kaj televido (http://www.lrt.lt) ankaŭ informas pri tio kaj publikigas kelkajn fotojn de Vytenis Andriukaitis:
https://www.lrt.lt/naujienos/lietuvoje/2/1146460/eurokomisaro-kadencija-baigusiam-andriukaiciui-aukstas-tarptautinis-postas

Povilas Jegorovas

# SEMINARIO PRI INTERLINGVISTIKO KAJ PLANLINGVOJ

La 21an de februaro 2020 la Libera Brusela Universitato (Vrije Universiteit Brussel, VUB-) organizis seminarion pri interlingvistiko kaj planlingvoj. Post enkonduko en la mondon de la planlingvoj, farita de d-ro Federico Gobbo el la Universitato de Amsterdamo, okazis fulmokurso kun la prezento de Esperanto kaj debato pri neŭtrala mondolingvo en kvar laborgrupoj.

Sesdeko da studentoj kaj docentoj ĉeestis la seminarion. Ili aktive partoprenis la fulmokurson kaj poste havis interesajn demandojn. Ĝenerale la publiko reagis entuziasme al la aranĝo.

La 19an de marto alia libera universitato en Bruselo, Université Libre de Bruxelles (ULB) organizos konferencon pri Esperanto. Estas la intenco estonte organizi en ambaŭ universitatoj babilrondojn en Esperanto paralele al tiuj en aliaj fremdlingvoj.

Kristin Tytgat

# ARDA KAJ MULTKOLORA INTERLINGVISTIKA SESIO EN LA SUNA POZNANO



La studentoj de la 3-jaraj Interlingvistikaj Studoj de UAM atingis sian sesan, do lastan semestron per la februara sesio (1-7.02.2020). En la lasta jaro ili jam laboris en du specialiĝoj: komunikado kaj instruado, krome komencis pretigi la finlaboraĵon kiun ili defendos kadre de la lasta ekzameno en septembro.

Al la komunikada specialiĝo – krom la lokaj stabanoj Ilona Koutny kaj Michael Farris koncerne la lingvajn aspektojn de komunikado – kontribuis ĉi-foje ankaŭ pola psikologino, Danuta Leyk pri psikologiaj aspektoj de komunikado kaj prof. Bengt-Arne Wickström, konata specialisto pri lingvoekonomio per kurso pri la ekonomiaj kaj politikaj aspektoj de komunikado. Cetere, li prezentis ankaŭ anglalingvan prelegon pri lingvopolitiko kadre de la sciencaj prelegoj de la Etnolingvistika Instituto (kie nun funkcias la Studoj) la 5-an de februaro.

Al la instruista specialiĝo aliĝis ankaŭ aliaj partoprenantoj por unu jaro kadre de la instruista trejnado kiu realiĝas en la kunlaboro de UAM, ILEI kaj Edukado.net. Katalin Kováts gvidis la plejparton de la specialiĝo kun granda elano kaj sukceso. Kontribuis al la programo Zsófia Kóródy el la Interkultura Centro en Herzberg kaj Ilona Koutny i.a. prezentante tiklajn problemojn el esperanto-gramatiko. Mallongan kurson pri e-literaturo gvidis Anne Jausions, eksstudentino de la Studoj.

Por ĉiuj estis interese aŭskulti la prelegojn de Renato Corsetti pri la nuntempaj problemoj de esperanto-movado kaj diskuti kun li pri la nunaj perspektivoj. Barbara Pietrzak traktis amaskomunikadon ĉerpante el siaj spertoj. Jam la unuan tagon okazis du prelegoj inter la informoj kaj konsultiĝoj: pri infanĝardena e-instruado far Grażyna Szubryczyńska kaj pri interkultura edukado far prof. Przemysław Grzybowski el la Universitato de Bydgoszcz. Okazis aldona prelego de François Lo Jacomo pri Unesco kaj de Barbara Pietrzak pri la pola Nobel-premiitino, Olga Tokarczuk.

Sume partoprenis la sesion 17 studantoj: 7 el la postdiplomaj studoj kaj 10 el la instruista

trejnado, ili venis el 9 landoj (Brazilo, Francio, Germanio, Italio, Koreio, Meksiko, Pollando, Rusio, Usono), inter ili ankaŭ akademianoj. Bedaŭrinde la ĉina partoprenantino, Ĝoja ne povis veni pro la epidemio en Ĉinio.

La bonetosa komuna vespero nun komenciĝis per posttagmeza programo: Renato Corsetti prelegis pri denaskismo, poste Barbara Pietrzak donis informojn pri la pola generalo Kościuszko [Koŝĉuŝko], fine okazis la aŭtora prezentiĝo de Anna Löwenstein. Kiel kutime ankaŭ la gestudentoj prezentis kantojn, dancojn kaj muzikon. La meksika ritmo kaj fine la kantoj de Zuza Kornicka kaptis la partoprenantojn.

La sesion akompanis sabate agrabla ekskurso al Gniezno kun sia malnova katedralo. Bildoj troviĝas en la albumo de Edukado.net.

Ilona Koutny
Gvidantino de la Interlingvistikaj Studoj UAM
(La Ondo de Esperanto)

# EDUKAJ EVENTOJ DE E@I EN 2020

E@I okupiĝas pri diversa agado – unu el ili estas organizado de edukaj aranĝoj. Ĉi-jare atendas vin pluraj edukaj kaj ĉefe prilingvaj eventoj, organizitaj de E@I! Jen ilia skiza prezento:

La unua estas **Polyglot Gathering 2020 (26.-30.5., Teresin, Pollando)** – unu el la plej grandaj kunvenoj de poliglotoj kaj lingvemuloj. Pasintjare ĝin partoprenis 654 homoj de la tuta mondo, kiuj parolas ekde 1 ĝis pli ol 30 lingvoj. La plej oftaj parolataj lingvoj estas la angla, la hispana, la germana, la franca, la rusa kaj Esperanto. Dum 5 tagoj la partoprenantojn atendos riĉa programo en diversaj lingvoj, inkluzive de prelegoj, diskutoj, praktikaj kursoj k.s. kaj amuziga vespera programo. Pli da informoj: www.polyglotgathering.com.

**Somera Esperanto-Studado (18.-26.7., Kroměříž, Ĉeĥio)** estas ĉiujara semajna internacia lernejo de Esperanto por kaj komencantoj kaj progresintoj, kiu okazos la unuan fojon en Ĉeĥio. Dum sia 14-jara daŭro ĝi iĝis la plej granda somera E-lernejo tutmonde, kun 200-250 partoprenantoj el ĉ. 30 landoj. Dum SES okazos kursoj de Esperanto de ĉiuj niveloj, kurso pri E-literaturo kaj kulturo kaj speciala kurso pri tradukado. Post la matena instruado okazos bunta taga kaj vespera programo. Retpaĝo de SES: ses.ikso.net.

Paralele kun instruado okazos **SEP – Somera Esperanto-Programado.** Ĝi estas la unua en Esperantujo kodummaratono (“hackathon”), la celo de kiu estas krei funkciantan programaron fine de la evento. Dum ĝi programistoj kaj aliaj fakuloj de program-kreado, inkluzive de grafikistoj, projektmanaĝeroj kaj aliaj, intense kunlaboras por realigi komputilajn projektojn, utilajn por Esperantujo. Retpaĝo de SEP: sep.ikso.net.

En septembro okazos **LingvaFest’ (16.-17.9., Nitro, Slovakio** – la unua kaj ununura internacia lingva festivalo en Slovakio. Unu el la ĉefceloj de la aranĝo estas proksimigi la riĉecon kaj buntecon de la lingvoj de Eŭropo ka la mondo. La kerno de la programo estas duonhoraj fulmokursoj pri diversaj lingvoj, kiuj celas prezenti iun parton de la lernado de specifa lingvo, kutime la elparolregulojn, bazajn frazojn, specifaĵojn de la gramatiko k.s. Krom tio okazos aliaj prilingvaj prelegoj kaj kultura programo. Retpaĝo de LingvaFest’: www.lingvafest.sk.

**KAEST (1.-4.10., Modra, Slovakio)** – estas Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, ĝi estas serio de seminarioj kaj konferencoj ekzercantaj scienc-teknikan aplikon de Esperanto. Ĝia ĉi-jara ĉeftemo estas “***Scienco kaj tekniko kiel rimedoj por efektivigi daŭripovan evoluon***”. La programo enhavos prelegojn (en du paralelaj blokoj – ĉeftemaj kaj alitemaj), trejnadojn, fakajn diskutojn pri scienco kaj tekniko kaj vesperan neformalan programon. Retpaĝo de KAEST: kaest2020.ikso.net

Petro Balaž

# RIĈA PROGRAMO EN LA HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO



La 79a Hispana Kongreso de Esperanto okazos ĉijare inter la 30a de aprilo kaj la 4a de majo en la nordo de Hispanio, ĉe la marbordo de la regiono Kantabrio, konkrete en la urbo Comillas. Tiu ĉi estas historia urbo, kun malnova arĥitekturo, mezepokaj kaj barokaj konstruaĵoj inter kiu elstaras malnova Pontifika Universitato kaj pluraj palacoj, plus aliaj pli novaj monumentoj, el kiuj plej menciindas la t.n. Kaprico, unu el la solaj tri konstruaĵoj desegnitaj de la fama modernisma arĥitekto Antoni Gaudí ekster Katalunio.

La sidejo estos kulturcentro nomata “El Espolón”, kiun la urbestraro de Comillas metis je dispono de la organizantoj. La 25an de februaro la prezidantoj de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio, kaj de la Loka Kongresa Komitato, Carlos Cordero, kunvenis kun la konsilisto pri kulturo de la urbestraro de Comillas, Pedro Velarde, por daŭrigi

la pretigadon de la renkontiĝo, kaj oni konstatis la grandan kunlaboron kiun la aŭtoritatoj montras en la organizado de la renkontiĝo.




Comillas troviĝas tre proksime al la ĉefurbo de la regiono, Santandero, al kiu alvenas flugoj el multaj urboj el Eŭropo. Ĝuste Santandero plus alia tre bela najbara urbo, Santillana del Mar, estos la celo de ekskurso en la lasta tago de la Kongreso. La unuan tagon kongresanoj povos viziti la plej belan groton de Hispanio, nomatan "El Soplao". Postkongresa ekskurso, por tiuj kuj disponos je pli da tempo, konsistos el piedmarŝado laŭ la Jakoba Vojo, sed ne laŭ la plej konata varianto (la t.n. Franca Vojo), sed laŭ pli antikva vojo, kiu laŭiras la marbordon.
La organizantoj jam anoncis la bazan kulturan programon, en kiu ĉefrolos muziko. Oni jam konfirmis la partoprenon de la kataluna grupo Kaj Tiel Plu, la tuluza artisto JoMo kaj la itala kantisto Kjara (Chiara Raggi), unuafoje koncertonta en Hispanio. La poeto Miguel Fernández gvidos poezian-muzikan spektaklon surbaze de novaj kantoj kaj deklamoj de poemoj el liaj poemaroj. Ankaŭ prezentiĝos muziko kaj dancoj tipaj de la regiono Kantabrio. La muzikaj koncertoj okazos en korto de la kulturcentro kaj estos malfermaj al la loĝantaro de Comillas.




La ĉeftemo de la kultura programo centriĝos ĉirkaŭ la tradukado de iberia literaturo al Esperanto, kaj ni kalkulas je la ĉeesto de pluraj nuntempaj literaturistoj de Esperanto. Oni antaŭvidas ankaŭ feston kun ses invititaj kantabraj poetoj. Aliaj eroj de la programo, kulturaj, organizaj, distraj, estas publikigataj en la retejo de la kongreso.

Dum la kongreso oni elektos novan estraron de Hispana Esperanto-Federacio, pro fino de la antaŭa deĵorperiodo.

Je la fino de la dua aliĝperiodo oni jam superis la nombron de 120 aliĝintoj. Ĉiuj detaloj pri la kongreso, inklude de alveneblecoj, loĝado, praktikaj informoj, plus la maniero rete aliĝi troviĝas en la retejo de la Kantabra Esperanto-Asocio, http://esperanto.es/kongreso.

Tonio del Barrio

# PARLAMENTA MEDALO POR POVILAS JEGOROVAS




La 4an de februaro 2020 la seppersona konstanta komisiono de la Litovia parlamento (Sejmo) per sekreta voĉdonado decidis atribuii la parlamentan medalon de Gabrielė Petkevičaitė-Bitė "Tarnaukite Lietuvai" (Servu al Litovio ) al la multjara prezidanto de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas pro lia esperantista agado.

La medalo, establita en 2011, havas la nomon de la elstara Litovia virino Gabrielė Petkevičiatė-Bitė (1861–1943) pro tio, ke, krom multaj aliaj tre gravaj agadoj, ŝi estis membro de la unua Sejmo kaj, kiel la plej aĝa membro, prezidis la unuan kunsidon de la parlamento la 15an de majo 1920.

Ĉi tiu plej alta distingo de la Litovia parlamento ekde 2011 estas ĉiujare atribuata al maksimume 16 eminentaj personoj – po maksimume al kvar personoj en kvar diversaj kategorioj pro volontula socia agado. Povilas Jegorovas ricevis medalon en la kategorio "Pro disvastigo de kulturo de volontula agado". Per ĉi tiu medalo oni mencias meritojn al la Litovia ŝtato kaj ties bono, iniciaton kaj realigon de pozitivaj ideoj por civitana socio, nacia kaj kultura konscio.

Siajn rekomendojn al la parlamenta komisiono por dekori Povilas Jegorovas per ĉi tiu medalo prezentis jenaj personoj kaj organizaĵoj:
1. Eksa Membro de Eŭropa komisiono Vytenis Andriukaits.
2. Eksa prezidanto de Sejmo Česlovas Juršėnas.
3. Parlamentano Tomas Tomilinas.
4. Eksterordinara kaj plenrajta ambasadoro Rimantas Šidlauskas.
5. Verkisto kaj ĵurnalisto Laimonas Inis.
6. Monda centro de litovoj pri scienco, kulturo kaj edukado.
7. Litovia libroamanta societo.
La decido de la komisiono estas publikigita en la retejo de la parlamento kaj en multaj amaskomunikiloj de Litovio.

La enmanigo de la medaloj okazos en solena ceremonio la 27an de marto en Panevėžys. La medalojn enmanigos la prezidanto de la Litovia parlamento Viktoras Pranckietis.
Ni sendas korajn gratulojn al nia eminenta samideano okaze de plia ŝtata rekono de lia brila esperantista agado.

Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov

# KONFERENCO ALP-ADRIA EN RIJEKA (KROATIO)

En kroatia ĉeborda urbo Rijeka okazos inter la 5-a kaj 7-a de junio 2020 Konferenco de esperantistoj el Alp-Adria regiono (konsistas el kelkaj regionoj en Italio, Slovenio, Kroatio, Aŭstrio, Alpa parto de Germanio kaj sudokcidenta Hungario). Ĝi estas tradicia ĉiujara konferenco kaj nun estas aparte interesa pro la urbo Rijeka kiu en 2020 estas eŭropa kultururbo kun multegaj kulturmanifestaĵoj. Do, indas veni ĉar krom la Esperanto-etoso vi povos trovi ankaŭ diversajn kultur-aranĝojn dediĉitaj al Eŭropa kulturo.

Vjekoslav Morankić

## Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.
Finredaktita: la 29-an de februaro 2020
Redaktoro: Zlatko Tišljar

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Jozef Reinvart, Michele Gazolla, Povilas Jegorovas, Ilona Koutny, Kristin Tytgat, Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov, Vjekoslav Morankić

Retpaĝo: http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno

Eŭropa Esperanto-Unio
Por efika kaj maldiskriminacia komunikado
www.europo.eu